

ENHAVO

ADRESO NEKOMPLETA

Eugene DE ZILAH 3

EL VIAJ LETEROJ ...

Antonio VALÉN, Peter BROWNE
Christian DECLERCK, HU Guozhu
Dimitar HAĜIEV, Jiří PATERA 7

SNORRI STURLUSON

la islanda mezepoka aŭtoro
Sigurður H. PÉTURSSON 10

OSIEK-PREMIO '2007'

5 aŭtoroj plej multe proponitaj . . . 18
Aliaj proponoj 19

SUR INSULO DEZERTA...

Nur tri libroj?
Trevor STEELE 20

ILI DIRIS...

Livio REBREANU tra Ionel ONET . . 21

KRUCVORTENIGMO 'KVE-131'

MAGDA LENA 21

PROFUNDA KORVERŜO

EN MODESTA PAROLO
HU Guozhu 22

LA INFERO DE KURISU KEI

Jean DOUBLET 24

CENT JAROJ DA VIGLA AGADO

Esperanto en Berlino
recenzo: Ed BORSBOOM 25

"HODLER EN MOSTAR"

de Spomenka ŜTIMEC
•recenzo: Jacqueline LEPEIX . . . 26
•recenzo: EDZ 27

ŜAKPROBLEMO 'ŜPB-131'

Algis KASPIRAVICIUS 28

MALPLANLINGVE 3

Josef KAVKA 28

POST-CIBERPUNKA ROMANO

La enigmo de l'@ranco de Abel MONTAGUT
recenzo: Federico GOBBO 29

"AJNASEMAJNE"

de Gerrit BERVELING
•recenzo: Kees RUIG 30
•recenzo: RÖSSLER Franz-Georg 31

DEFIO POR GEPATROJ

Eduku geniulon!
de László POLGÁR tra Jozefo HORVATH
recenzo: László J. TÓTH 32

ARANEAJŬOJ

Daniel PELLIZZARI tra Luiz PORTELLA 35

FAVORATOJ POR OSIEK-PREMIO 2007:

Enrico DONDI, Albrecht KRONENBERGER,
Ĵak LE PUIL & Armela LEQUINT,
Baldur RAGNARSSON, Spomenka ŜTIMEC

Karaj Amikoj,

La Gazeto ĝenata de la blanka teroro: pri tio vi legos ĉi-kajere la vortojn de la redaktoro.

La suspenso por Osiek-premio: alvenis 65 proponoj, el ili 34 por la 5 plej multe proponitaj aŭtoroj – Baldur RAGNARSSON unuafoje inter ili (por *Sagao de Njal*), 31 por 16 aliaj aŭtoroj (Eugène DE ZILAH preferas ne esti en la listo, tiom longe kiom li estas en la komitato de Osiek).

LG131 vere mondkultura: ĉiuj mondopartoj kontribuis, inkluzive Latin-Amerikon per mikronovelo de juna verkisto kaj Aŭstralion per zorga elekto de libroj far Trevor STEELE cele al dezerta insulo.

LG131 iom fiera: ĝi trovis sufiĉan spacon por la brila, klera, detala prezento de islanda mezepoka 'koloso', Snorri STURLUSON, kaj lia ĉefverko, *Snorra-Edda*. Dankon al Sigurður PÉTURSSON.

LG131 recenzoriĉa: ja, bonaŭgure pri la vigla kultura vivo de nia komunumo.

LG131 literabunda: mi malplenigis la tirkeston antaŭ la kvar-monata paŭzo, kaj dankas vin pro via sincero kaj sagaco. Ĝis nova rikolto en oktobro.

Madeleine de Zilah

PRI STILO KAJ ENHAVO DE SUBSKRIBITAJ ARTIKOLOJ LA GAZETO NE RESPONDECAS

Eldonanto kaj redakta rondo: Esperanto-Klubo de Metz. **Redaktoro:** Eugène de ZILAH. **Kunredaktistoj:** Ed BORSBOOM, K JAKOBO, Madeleine de ZILAH. **Redaktejo:** *La Gazeto, 12 sous la Ville, 55210 CREUË, FRANCIO*

gazeto@aol.com

Retkunlaboranto: Bruno MASALA

lagazeto@osiek.org

TTAdreso: <http://www.lagazeto.com>

Helpis por ĉi numero: Miroslav KUČHTA, Dominika RANDUSOVÁ, Edgar kaj Paola DE ZILAH. **Abonprezo:** 28 € por 6 numeroj; ekster Eŭropo: 32,5 € maksimume. Eblas komenci abonon iam ajn. Poŝtkonto: 102502 T Nancy, Francio. **UEA-konto:** ZILAH edzi-k. Se elmetiĝas problemo skribu; ni klarigos al vi kiel aboni el via lando. **LG** ne aperas en jul.aŭg.sep. **Anoncoj:** 1/4 da paĝo, 30 eŭroj. **Recenzoj:** bonvolu sendi 2 ekzemplerojn de la libro al la redaktejo.

LA VENONTA NUMERO APEROS JE
31a de oktobro 2007

A B O N P R E Z O J K A J P E R A N T A R O

Aŭstrio: 28 €, d-ro Klaus PERKO, Lendkai 111, 8020 Graz – Poŝtkonto: Graz 1257 845. **Aŭstralio:** 55 \$, AEL-Libroservo, 143 Lawson Street, Redfern NSW 2016. **Belgio, Luksemburgio:** 28 €, Flandra E-LIGO, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen – Ĝirkonto: 000-0265338-43 Vlaamse Esperantobond. **Brazilo:** 32,5 €, BEL, Caixa Postal 03625, Brasilia/DF 70084-970. **Britio:** 20 pundoj, David KELSO, 5 Craighenhill Road, ML8 4QT Kilncadzow, Carluke. **Bulgario:** 16 levoj, Georgi MIHALKOV, "Nadejda" V, bl529 vh A et9 ap33, 1229 Sofia. **Ĉeĥio:** 650 kronoj, Pavel POLNICKÝ, Na Vinici 110/10, 29001 PODĚBRADY. **Ĉinio:** 20 irkoj senditaj al La Gazeto. **Danio:** Arne Casper, DEA, Bryggervangen 70 4.tv., 2100 Kobenhavn. **Finnlando:** 28 €. **Francio:** 28 €, LA GAZETO, 12 sous la Ville, 55210 Creuë – Poŝtbankkonto: 1025 02 T Nancy. **Germanio:** 28 €, Rolf Beau, Eisser Kirchweg 18, 27333 Schwering. 30 €. **Grekio:** 28 €, Polyxeni ZARKADA, Pl. Pavlou Kountouriotou 7/8, 11741 Athina. **Hispanio:** 28 €, Barcelona E-Centro, Bassegoda 40 3° 1a, 08028 Barcelona. **Hungario:** 4900 forintoj, Pál KOZSUCH, Vasut u. 3, 5553 Kondoros. **Italio:** 28 €, Elda DOERFLER, Via Ghirlandaio 18/1, 34138 Trieste – Poŝtkonto: 17452996. **Japanio:** 5200 enoj, Japana E-Instituto, Wasedamati 123, Sinzyuku-ku Tōkyō, 162. **Kanado:** 45,5 \$, David MOORE, PK 653, Sicamous/BC, VOE 2VO. **Kroatio:** 19 €. **Latinameriko:** 36 irkoj. **Nederlando:** 28 €, ESPERANTO, Noordweg 34, 3704 GN Zeist – Poŝtkonto: 7231449. **Norvegio:** 220 kronoj, Norvega E-Asocio, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo. **Pollando:** 103 zlotoj, Maciej WNUK, ul. Broniewskiego 77m, 01-865 Warszawa. **Portugalio:** 28 €, Portugala E-ASOCIO. **Slovakio:** 19 €. **Svedio:** 290 kronoj. **Svislando:** 44 frankoj, Christoph SCHEIDEGGER, Im Schleedorn 6, 4224 Nenzlingen. **Rusio:** 8 Eŭroj, Halina GORECKA, 236 039 Kaliningrad, ab. ja. 1248. **Usono:** 40 \$, ELNA, PK 1129, El Cerrito/CA 94530. **UEA:** Eŭropo: 28 € (krom PL CZ SK HU KR YU LT 20€), Usono kaj Kanado: 31 €, Afriko kaj Mez-Oriento: 30 €, aliaj neeŭropaj landoj: 32,5 €. **UEA-konto** edzi-k. **FEL:** Eŭropo: 28 €, US kaj CA: 31 €, Mez-Oriento: 30 €, aliaj neeŭropaj landoj: 32,5 €. **FEL-konto** gaze-j.

INTERNACIA ESPERANTO-KONFERENCO en Pazarĝik, BULGARIO, 14-20jul07
prelegoj, debatoj, muzeoj, ortodoksaj preĝejoj, vinkeloj, libroservo ...
21-23 julio: postkonferencaj vizitoj al originalaj lokoj
atribuado de OSIEK-premio 2007



OSIEK: <http://osiek.org>

MITOJ KAJ LEGENDOJ

- Maria BUTAN: *La digneco en la rumanaj legendoj.*
Mantha CHRISTOU: *La grekaj mitoj en la historio kaj la vivo.*
David KELSO: *Nacia identeco surbaze de mitoj kaj legendoj.*
Georgi MIHALKOV: *Riĉeco de vilaĝaj legendoj.*
Radka STOJANOVA: *La amikoj kaj la kalifo.*
Petar TODOROV: *Legendoj el la regiono de Vraca.*
. Ljubomir TRIFONĈOVSKI: *Esperanto inter mitoj, legendoj kaj realo.*

Eric LAUBACHER
1, rue Bougainville
78180 Montigny-Bx, Francio
tel. +33 1 30 96 6791
kasisto@osiek.org

Georgi MIHALKOV
j.k. Nadejda V, bl 529, vh A et 9 ap. 33
1229 Sofia, Bulgario
tel. (02) 934-42-55
modest@abv.bg


KVIN ESPERANTISTOJ PLEJ MULTE PROPONITAJ

Enrico DONDI: traduko
Purgatorio de DANTE

Fonto, BR, 2000, 256p. A4

Dante estas la plej varme erotika itala poeto, kaj samtempe la plej dokta el teologia kaj filozofia vidpunktoj...: streĉa tensio...


Nun, tiu tensio venas al ni en Esperanta formo dank' al sindediĉa strebo de Enrico Dondi, kiu dum sia tuta vivo tradukis, poluris, plibonigis ĉi tiun tradukon; kaj la finfina – tiom malfruiganta! – presita versio estas probable ankoraŭ ne la lasta, ĉar supozeble Dondi ne ĉesos reveni al la eterna poemo. Oni ne povas liberigi de Dante... [la] tradukisto... enfokusigis la ambician celon de rigora fideleco ne nur al la enhavo, sed ankaŭ al la formo de la Dantea poezio. *Esperanto, decembro 2003, Mauro NERVI*



senpasje, objektive, sed ankaŭ kun bonkoreco – ĝis la fino, kiu estas ekster la antaŭsento de la legantoj. Ilia sentimento post la legado estas tiu pri la stulteco de la homo kaj lia preskaŭ azi-ece rezignacio.

Komence de la romano, la protagonisto sekvas konscripcian grupon kaj sin trovas en la armeo. Li estas kvazaŭ infano, li ankoraŭ ne konas sin mem. Li tamen komencas pensi mem. Li iras ĉe la germanan fronton en Norda Francio. Tie li liberigas sin de la mito 'patriotismo'. [...]


LG130, ЯАМАСАХИ Seikō



Albrecht KRONENBERGER: redaktado

Adoru, IKUE kaj KELI, Italio, 2001, 1472p.

En *Adoru*, protestantoj, katolikoj kaj ortodoksanoj unuiĝas por prezenti la riĉon de siaj tradicioj kaj trezoroj en liturgio kaj Diservo. La kolekto enhavas tradukojn de la ĉefaj tekstoj el la diversaj eklezioj kaj inkluzivas nombron da Diservaj modeloj kaj liturgia materialo kiu estigis per la liturgia movado kaj per la laboro de la Ekleziena Konsilio de Eklezioj. En si mem tiu laboro klopodas esti esprimo altiri homojn al unueco, samtempe helpante al ili apreci la diversecon kaj la riĉojn en la esprimado de laŭdado por la gloro de Dio.



salut-vortoj enkondukaj, pastro Alan FALCONER

Armela LEQUINT & Jak LE PUIL: traduko

VOJAĜO ĜIS NOKTOFINO de L-F. CÉLINE

Mondial, US, 2005, 370p.

La tradukintoj starigis grandegan monumenton, mejloŝtonon en la esperanta literaturo. Ĝia simpla volumo estas jam enorma, pro kio ni dankas al ili. Ni ŝuldas al ili dankon.

Okulfrapa karakterizo de la romano estas ĝia apolitikeco, politikneŭtraleco, dum plej multaj esperantistoj estas progresemaj, multaj el ili eĉ revoluciemaj, kiel la Sat-anoj. La 'mi-rakontanto' (*Ich-Erzähler* germane) priskribas sian vivon

Baldur RAGNARSSON


SAGAO DE NJAL: traduko

FEL, Belgio, 2003, 358p.

Por tiuj, kiuj ne komprenas la islandan, la kvalito de la traduko estas certigita per la fakto, ke ĉi tiu versio estis farita de Baldur Ragnarsson, akademiano kaj konata poeto-verkisto, verkanta kaj en la islanda kaj en Esperanto. La rezulto de lia laboro estas ne nur kompetenta, sed vere elstara, prezentanta gravegan kontribuojn al la kreskanta nombro da esperantigitaj juveloj de la monda literaturo.

[...] Laŭ internacia enketo inter eminentaj verkistoj en la jaro 2002, ĝi estis elektita kiel "unu el la cent plej bonaj verkoj de la monda literaturo".

Monato 2004/7-8, Garbhan MACAOIDH



Spomenka ŠTIMEC

KROATA MILITA NOKTLIBRO

Pro Esperanto, AT, 1993, 104p.

"Prelego esperantlingva ebligis min renkonti la kroatinon Spomenka Štimec en 1990 [...]

Tamen tiu mondanguleto estis en paco. Ĉu Spomenka Štimec havis antaŭsenton de la eventoj poste okazontaj. Kiam la milito eksplodis, mi repensis pri [ŝi]. Multe pli malfrue, mi eksciis ke ŝi estis ŝirita, ĉar ŝi havis ŝatatajn gekuzojn serbajn. Ŝian belan sinceran ateston mi decidis traduki por konigi ĝin en Francio.

La libro jam estis tradukita en la japana kaj la germana, kaj eble baldaŭ estos tradukita en la itala [...]

Oni ne eliras ne tuŝita el la legado de tiu libro. Kelkaj amuzaj anekdotoj ornamas la rakonton ofte malĝojan. Kaj ĝi finiĝas per pozitiva « noto »

LG116, Ginette MARTIN



ALIAJ PROPONOJ RICEVITAJ

Marc Bavant: *MATEMATIKA VORTARO*, 232p.

La majstrecio de la verko rezidas en tio, ke Bavant kombinis la leksikan laboron kun kuraĝa terminologia klopodo.

LG113, Johan DERKX

Gerrit BERVELING: *LA DUAKANONAJ LIBROJ*, 2vol., 526p., traduko.

... originala verkado estas esence egoisma ... Sed tradukisto agas pli altruisme; Gerrit Berveling daŭre donas al ni la frukton de siaj historiaj konoj kaj lingva kapablo.

Fonto 247, Trevor STEELE

Mikaelo BRONŜTEJN: *DEK TAGOJ DE KAPITANO POSTNIKOV*, 332p.

... Postnikov [...] vojaĝis per ŝipo por ĉeesti la 6an internacian kongreson de E-o en usona Washington, kune kun Zamenhof kaj [...]

Tra la verko riĉas la stilo, proza, konversacia, priskriba, poezia, ĵurnalisma, politika ...

LG120, MAO Zifu

Batista CADEI: *LA GEFIANĈOJ (MANZONI)*, traduko, 496p.

... pri la kultura kaj socipolitika situacio en la Milana teritorio en la frua 17a jc.

Esperanto, aprilo 2006

István ERTL: *SENSORTECO (KERTÉSZ)*, traduko, 208p.

La ĉefpersono de *Sensorteco* estas 14-15-jara junulo... kiu rakontas unuapersonale siajn travivaĵojn.

Pri la traduko en bonan 'atlantikan' Esperanton, mi ĉi tie diras nur ke ĝi indas je OSIEK-premio.

LG110, Eugene de ZILAH

Sabine FIEDLER: *ESPERANTA FRAZELOGIO*, 186p.

Sabine Fiedler per *Plansprache und Phraseologie* metis solidan fundamenton sub nova branĉo de interlingvistiko kaj esperantologio: frazeologio. La aŭtorino 'reverkis' sian ampleksan disertaĵon en *Esperanta frazeologio*.

LG115, Adriaan den HAAN

Boris KOLKER: *VOYAGŔO EN ESPERANTO-LANDO*, 280p.

... laŭteme [la librol] prezentas la kulturon de Esperanto tia, kia ĝi estas: vasta, varia, viva.

La Brita Esperantisto, sep-okt96, Paul GUBBINS

LAŬLUM: *ĈE AKVORANDO (SHI Nai'an kaj LUO Guanzhong)*, traduko, 3 vol., 1830p.

La verko apartenas al la klasikajoj de la nuna ĉina civilizacio. La varpo de la verkaĵo estas la koncentriĝo de revoluciaj fortoj kaj la vefto la individuaj aventuroj de revoluciuloj kaj reakciuloj celantaj helpi aŭ malhelpi tiun koncentriĝon.

LG123, Eugene de ZILAH

Daniele MISTRETTA: *LA SERĈADO DE LA PERFEKTA LINGVO* (Umberto ECO), traduko, 320p.

... mi devas gratuli la tradukinton pro flua, eleganta elitaligo.

La Brita Esperantisto, sep-okt96, Paul GUBBINS

Daniel MOIRAND: *LA LIBRO DE LA MIRINDAĴOJ* (Marco POLO), traduko, 446p.

Fama kultur-pera verko de la mezepoko, riĉa observaro de vigl-okula venecia komercisto ...

Esperanto, julio-aŭgusto 2001

Josip PLEADIN: *ORDENO DE VERDA PLUMO*, kompilado kaj redaktado, 272p.

La intenco de nia libro estis prezenti la verkaĵojn ne per iliaj verkoj, kiel tion faras la antologioj, sed prezenti ilian personecon, la vivon kiun ili travivis, kelkfoje eĉ iom nekutime prezenti ilin el faktografia vidpunkto

enkonduko al la libro, Josip PLEADIN

Sergio POKROVSKIJ: *LA MAJSTRO KAJ MARGARETA (BULGAKOV)*, traduko, 376p.

Per la traduko de Pokrovsky *La Majstro kaj Margareta* ankoraŭ foje superas la lingvaj limojn de la rusa [...] kaj [...] fariĝas heredaĵo de la tutmonda E-kulturo.

enkonduko al la libro, Spomenka ŠTIMIĆ

kaj *KOMPUTIKA LEKSIKONO*, 368p.

Unue ĝi estas bonkvalita leksikono en Esperanto kun speciala akcento al la subfakoj matematiko en komputado, programado ...

Esperanto aktuel 2-3/97, Michael BEHR

Harald SCHICKE: *LA KORPO DE LA HOMO*, 148p.

Jen libro peranta al vi la bazajn sciojn pri konstruo kaj funkciado de la homa organismo. En lingvaĵo komprenebla por laikoj vi konatiĝas kun la mirakloj de la homa vivo ...

Harald SCHICKE

SHI Chengtai: *POEMARO DE LI BAI*, traduko kaj kompilado, 148p.

... kune kun *Penseo* kaj la verkoj de MAO Zifu la libro aŭguras bone pri kreskanta ĉina kontribuo al E-kulturo.

LG78, Kris LONG

Bertilo Wennergren: *PLENA MANLIBRO DE ESPERANTA GRAMATIKO*, 696p.

Tiu ĉi verko celas ordinarajn Esperantistojn, kiuj volas studi la gramatikon, vortfaradon, skribon kaj elparolon de la Internacia Lingvo. Ĝi estas unuvice praktika lernilo, ne teoria verko por lingvistoj.

enkonduko al la libro, Bertilo WENNERGREN

La **demokrata** atribuo de OSIEK-premio dependas de la societanoj. Ĉiu membro rajtas ĉiu-jare fari 2 malsamajn proponojn por la premio, antaŭ la 1-a de majo. Dum IEK (Internacia Esperanto-Konferenco – ĉi-jare en **Pazarĝik, Bulgario**, en julio) la OSIEK-anoj aliĝintaj al IEK **sekrete** voĉdonas. Se unu el la 5 aŭtoroj plej multe proponitaj ricevas pli ol duonon de la voĉoj, li estas premiita. Se ne, dua sekreta balotado okazas inter la du, kiuj havis la pli grandan nombron da voĉoj je la unua balotado. Okaze de egaleco oni konsideras la aŭtoron kiu pli frue estis inter la 5 plej multe proponitaj.